

Parto 2:

Volapük



VOLAPÜK en Svislando

La neŭtrala universala lingvo (internacia planlingvo) Volapük (Vp.) naskiĝis kaj disvastiĝis ekde 1879 en la plej suda parto de la Germana Regno, fakte en la tuja najbareco de Svislando: Konstanz-Litzelstetten, tiam aparteninta al la Badena Grandduklando, nomiĝas la centra loko, kie vivis kaj agadis la kreinto de Vp., Johann Martin Schleyer (1831-1912), kaj kie estis verkitaĵoj liaj volapukaj eldonaĵoj. En la katolika pastra domo de Litzelstetten Schleyer travivis sian legendecan Vp.-revelacion; Schleyer rakontis, ke li en „enigma, sekreto plena maniero, en malhela nokto en la pastra domo de Litzelstetten (...) vige cerbumis pri ĉiuj stultaĵoj, misoj, malsanoj kaj lamentindaĵoj de nia tempo“. Subite staris antaŭ li la „konstruaĵo“ de lia „mondolingvo kiel tuto antaŭ“ liaj „spiritaj okuloj“. Post tiu memorinda nokto de la 31a de marto 1879 Schleyer kompilis la gramatikon de Vp. La unuan skizon li aperigis en aldonaĵo de *Sionsharfe*, revuo fondita de Schleyer. La unua Vp.-lernolibro aperis en 1880 en Sigmaringen, la unua Vp.-mondkongreso okazis en 1884 en Friedrichshafen.



Pastra domo de J.M. Schleyer en Konstanz-Litzelstetten

La konstanca centra oficejo (Zentralbüro der Weltsprache) en Schottenstrasse 37 en Konstanz ekde 1889 kunordigis la propagandon por la nova mondolingvo. Diversloke ekzistas stratoj kaj tabuloj, kiuj memorigas pri Schleyer kaj Vp., en Litzelstetten eĉ ekzistas hotel-restoracio je la nomo de Vp.




Schleyer, Kerckhoffs

Komenco de la Vp.-movado en Svislando: Unu el la ĉefaj malfaciloj rekonstrui la historion de la Vp.-movado estas la neabundaj informoj pri la aktivuloj, kiuj estas disponeblaj. La Vp.-historio estas fora afero, skribaj kaj presitaj dokumentoj ekzistas relative malmultaj, kaj praktike ĉio en ĝi estas tro epizodeca. Pri la aktivuloj mem ofte estas konataj nur iliaj (familiaj) nomoj kaj loĝlokoj, kelkfoje ankaŭ iliaj profesiaj okupoj. Vivodatoj ekzistas nur esceptokaze; kie ili mankas, tie ili estas malfacile ekscieblaj.



Memorŝtono antaŭ la pastra domo en Litzelstetten



Memortabulo en Konstanz



Domo de Billinger ĉe Schottenstrasse 37 en Konstanz (fotoj de A. Künzli)

Kompare kun aliaj landoj en Svislando la Vp.-movado disvastiĝis relative malfrue, sed des pli intense. La 6an de novembro 1884 prelegis unuafoje pri Vp. Gottlieb Wirth (1863-1948) el St. Gallen dum instruista kunveno en Oberuzwil/SG. Iom post iom la intereso pri la nova mondlingvo kreskis, ĉar ĝia ideo mem fascinis la homojn. Ĉie efektiviĝis prelegoj kaj lingvokursoj. Kelkaj svisaj gazetoj kiel *Schweizer Volksfreund*, *Schweizerische Morgenzeitung*, *Schweizerische Verkehrszeitung*, *Schweizer Familien-Wochenblatt* k.a. volonte kaj favore raportis pri la nova fenomeno. La nombro de oficialaj svisaj Vp.-diplomoj sufiĉe rapide kreskis: 59 nomoj estis prezentitaj en la Vp.-jarlibro

Yelabuk pedipedelas (Paris 1889). La unuaj gravaj svisaj roluloj nomiĝis Josef Haggmann, sakristiano en Degersheim/SG, kaj Emil Sonderegger, komercisto en Herisau/AR. La internacia Vp.-ekzameno okazis en 1888 en Ĝenevo, Bern, Zürich, Herisau kaj St. Gallen. *Germanlingva Svislando*: Vp. ekprosperis en germanlingva Svislando, ĉefe en ĝia (nord-) orienta parto: en la kantonoj *St. Gallen*, *Thurgau* (*Turgovio*), *Appenzell*, *Schaffhausen*, *Zürich* (*Zuriko*) kaj *Aargau* (*Argovio*). La unuaj svisaj Vp.-kluboj estis fonditaj en 1887 (aperojaro de Eo!): marte en *Herisau/AR*, aprile en *Stein am Rhein/SH* de R. Etzweiler, junio en *Bremgarten/AG* de komercisto → *Anton Waltisbühl* (1855-1940, → Ido en Svislando), julio en *St. Gallen* de Moritz Brandt, komercisto, kaj en *Gossau/SG* de Otmar Forster, instruisto, decembre en *Kreuzlingen/TG* de iuj s-roj Scherer kaj Schweizer, seminarianoj de la porinstruista lernejo. La klubo en Herisau, kiun Schleyer en 1888 prelege vizitis, nombris en sia plej bona tempo 120 membrojn kaj kvindekona da gelernantoj. Same la klubo de St. Gallen prezentis pli ol 100 anojn. La 14an de januaro 1888 okazis en *Frauenfeld/TG* bone vizitata prelego en la kantona gimnazio, kiu estis organizita de la komercista societo. La loka agado kondukis al la fondo de societo, kies ĉefa aktivulo nomiĝis Britt. La 16an de junio 1887 ankaŭ en la urbo *Zürich* stariĝis Vp.-asocio kun ĉirkaŭ 60 membroj. August Ritter, poŝtisto en Zürich-Aussersihl, gvidis kurson pere de la ĵurnalo *Schweizerische Verkehrszeitung*. La ĉefa gravulo de la zurika movado nomiĝis *Jakob Walser* (1843-1932). Laŭ la disponeblaj fontoj ĉi tiu komercisto, bankisto, infanteria kapitano kaj papilio-kolektanto en Zürich-Oberstrass kunfondis la kantonan bankon de Grizono en Chur, la naturkuracistan asocion kaj aerbanejon en Zürich. Poste li ludis gravan rolon en la tutsvisa Vp.-organizaĵo, i.a. ekde majo 1888 kiel prezidanto (en Vp.: cifel jveizik) de *Volapükaklub jveizik* (t.e. Svisa Vp.-Societo) kaj kiel redaktoro de la Vp.-gazeto *Jveizapot* (Svisa Poŝto), aperinta en 1890-91. *Unuopuloj*: En plej diversaj lokoj de Svislando loĝis unuopaj vp.-istoj, pri kiuj biografiaj detaloj ne estas konataj. Laŭ profesioj relative alta procentaĵo inter tiuj adeptoj estis

instruistoj, sed ankaŭ komercistoj kaj ekleziuloj. Instruistoj estis ekzemple Josef Anton Geser en Bichwil-Flawil/SG, Wirth en Jonschwil-Toggenburg/SG, Bruderer en Speicher/AR, Lutz en Trogen/AR, Martin Breitler en Hefenhausen/TG, Heinrich Stadelmann en Stäfa/ZH, E.H. Grünenfelder en Bilten/GL, Emil Pfyffer en Bremgarten/AG kaj Franz Erzer en Seewen/SO. Inter la ekleziularo estas menciindaj patro Pirmin en Schwendi/SG kaj Sig(fried?) Stirnimann en Rapperswil/SG, ambaŭ kapucenoj, Josef Bättig de la monaĥejo Mariahilf en Altstätten/SG, frato Sigismund en Mels/SG, pastro Frei en Flums/SG, pastro Ricklin, samtempe eduka konsilisto en Walenstadt/SG kaj *patro Karl Kühne* (1850-1898), ano de la monaĥejo *Einsiedeln*, kie li instruis stenografion. La 4an de oktobro 1887 Kühne ricevis de Schleyer la titolon de Vp.-instruisto. Post sia pastrigo kaj primico en 1875, en 1897 li fariĝis rektoro de la greka kolegio de la sankta Atanazio en Romo, kie li mortis kaj estis ankaŭ entombigita. En 1889 la oficiala kalendaro de Einsiedeln/SZ aperigis eseon pri la Schleyera mondlingvo kun la bildo de la „datuval“ (kreinto).



Anton Waltisbühl, Friedrich Schneeberger


La lokaj aktivuloj en Rorschach/SG nomiĝis Jakob Gerster kaj Albert Hardegger. En Appenzell propagandis la lingvon Emil Sutter, arkitekto kaj posedanto de banejo en Gonten/AI. Plej diversaj fontoj (Vp.-gazetaro, studoj de Rupert Kniele k.a.) indikas, ke vp-istoj ekzistis krom en la jam menciitaj lokoj ankaŭ en Schänis/SG (Zahner, komunuma

sektetario), Quarten/SG (Klaus), Erlen-Altstätten/SG (Jacques Thüer), Rebstein/SG (Messmer), Au/SG (Gottfried Haug), Steintal-Kappel/SG (Lüber), Wolfertswil-Flawil/SG (Johann Isenring kaj Johann Näf), Bühler/AR (J. Ungemuth), Dussnang/TG (Rudolf Bosshard, brodisto), Eschlikon/TG (Bannwart, kapitano), Feuertalen/ZH (Albert Brauchli), Wädenswil/ZH (Schwitzer), Horgen/ZH kaj Rüti/ZH. En la grizona kanton oni scias pri iu d-ro Küng en Sent/GR, kiu okupiĝis pri Vp. Por *romanĉoj* Schleyer eldonis la okpaĝan german-retoromanĉan *Pükübs pükas rätoromanik, deutika e volapüka* (Konstanz 1896).

Sub la influo de pluraj propagandaj elpaŝoj parte akademiecaj ekzemple de prof. d-ro Jacob Wackernagel (1853-1938) la 10an de januaro 1888 kaj de G. Schmid el St. Gallen la 4an de majo en la bazela ŝuista gildo, en marto 1888 formiĝis Vp.-klubo en *Basel* kun 11 anoj, kiu iom poste kreskis al 22 membroj. La klubestroj nomiĝis W. Stauffacher, Stiren-Graf kaj d-ro Hotz. Ĝis la fino de la jarcento en Basel ekzistis eĉ tri diversaj Vp.-societoj. En la 1880aj jaroj en *Luzern* la lingvo estis propagandata de la neŝatelano *Alexander Ruedin* (1840-1897). Studinte lingvistikon, filozofion kaj juron en la munkena universitato (bavara ŝtatekzameno, 1864-67), li poste instruis la francan lingvon en München (1866-68) kaj en la kantona lernejo en Luzern (1868-97) kaj aŭtoris lingvistikajn studojn kaj didaktikajn lernilojn pri la franca lingvo. Lin aktive helpis Ulrich Gutersohn (1862-1946), instruisto pri desegnado, Wilhelm Wettstein (1853-1906), ĝardenisto (?), kiu prizorgis la Vp.-rubrikon en la gazeto *Luzerner Tagblatt*, kaj Gustav Bossard. La lucernaj vp.-istoj renkontiĝis en hotelo Adler. Alia tre fervora vp.-isto, Wilhelm Wick, direktoro de la komerca kaj lingva instituto en Meggen apud Lucerno, enkondukis la lingvon en la lernoplanon de sia lernejo kiel instruobjekton kaj fondis societeton. La klubo en Eschenbach/LU (fond. 1887) estis gvidata de Robert Geisser, Melchior Anderhub, Heinrich Schüpfer kaj Josef Feyer. En Sursee/LU aktivis Josef Lötscher (1856-1919), instruisto-rektoro, kiu estris 52-membran lokan Vp.-grupon kaj publikigis informojn

pri Vp. en la gazeto *Anzeiger für Sursee* (1888).

Kelkajn sciigojn oni posedas ankaŭ pri la Vp.-movado en *Berno*, kie la nombro de membroj kaj lernantoj sumiĝis je ĉirkaŭ 150 personoj. La 10an de januaro 1888 ĉi-urbe estis fondita societo, kies unua estro estis d-ro Eugen Buri. La ceteraj estraranoj nomiĝis Müller-Allemann (vicestro), Müller-Nöthinger (instruisto), Henzi, inĝeniero (unua sekretario), Spiess (dua sekretario), Keller (kasisto) kaj Ammon (bibliotekisto). La kunveno de la bernaj vp.-istoj troviĝis en la kafejo Roth en Amthausgasse. La menciita indikaro *Yelabuk pedipedelas* (1889) listigis ankaŭ la nomojn de Emil Kuratle kaj Brönnimann (Bern), en Kirchberg/BE loĝis J.R. Anderes. En 1887/88 Vp. lernis ankaŭ → *Friedrich Schneeberger* (1875-1926) en Biel-Bienne/BE. Schneeberger poste fariĝis grava e-isto kaj pli malfrue transiris al → Ido. 1889-1893 ankaŭ en *Solothurn* funkciis Vp.-klubo, estrata de d-ro *Konrad Meisterhans*, instruisto. La klubo aperigis la almanakecan periodaĵon *Glids volapükik se Solothurn* (en Eo: Volapükaj salutoj el Soloturno, 1891-93). Krom Meisterhans kontribuis en ĝi ankaŭ lia edzino Anna kiel poetino, Arni Friedrich kiel Vp.-instruisto, Robert Glutz, Werner Munzinger, Alfred Rudolf, H.R. Wyss kaj M. Anacker (studentoj), Paul Bucher, Otto Leber, E. Hochstrasser kaj Alice Sterk.



Periodaĵo *Glids volapükik se Solothurn*

Romandio/Tiĉino: En la franclingva parto de Svislando (Romandio) Vp. apenaŭ enradikiĝis, unuavice pro la forta koncentriĝo de la propagando en la germanlingvaj regionoj kaj probable ankaŭ pro la iom germanecaj trajtoj de tiu movado. Francio mem fakte nombris relative malmultajn Vp.-societojn, kie la propagando limiĝis al Parizo, loĝloko de Auguste Kerckhoffs (1835-1903). En la instituto Thüring-Merian en *Neuchâtel* la 28an de decembro 1887 prelegis iu profesoro Meyer pri Vp. kadre de la societo de junaj komercistoj. Unuopaj Vp.-adeptoj estis registritaj ankaŭ en *Fribourg* (Passer, instruisto, 1892), *Lausanne*, *Ĝenevo* (Wild, jun., Morin, Dissimoz, G. Lachenmeyer, E. Pfund), en *St. Maurice/VS* (1899) kaj en *Chiasso*, itallingva Tiĉino.



Gazetoj *Volapükafren jveizik / Schweizer Volapükfreund* kaj *Jveizapot*: Plej sube: Internacia gazeto *Volapükabled*



Tutsvisa organizo: La unua pli granda tutsvisa Vp.-kunsido, okazinta la 22an de septembro 1887 en hotelo Schützengarten en St. Gallen, arigis ĉirkaŭ 400 personojn, amikojn kaj eĉ kontraŭulojn de tiu nova lingvo. Schleyer persone ĉeestis la kunvenon, kies plej gravaj decidoj estis la preparado de svisa Vp.-organizaĵo kaj la fondo de asocia organo. La sugesto de iu d-ro Keller el Zürich eldoni Vp.-ligilon trovis la ĝeneralan aprobon kaj realiĝis en januaro 1888 sub la titolo *Volapükaflen jveizik* (germane: *Schweizer Volapükfreund*). La unua redaktoro de tiu dulingva monata periodaĵo nomiĝis G. Schmid en St. Gallen, ĝin eldonis F. Hasselbrink, librovendisto en St. Gallen. Unu jaron poste la redaktorado ŝanĝiĝis al C. Rietmann-Schmid, same el St. Gallen. La lanĉon de la svisa Vp.-revuo sekvis la starigo de tutlanda organizo. En marto 1888 ekfunkciis Iniciatokomitato por svisa nacia ligo, al kiu apartenis la samideanoj el St. Gallen, Gossau kaj Herisau: Schmid, Sonderegger, Schefer, Forster, Winterhalter, Vonwiller kaj Wehrli. La 5/6ajn de majo 1888, okaze de delegitaj kunvenoj en Zürich (Tonhalle, gastejo Zimmerleuten kaj lernejo Linth-Escher), la ĉeestantoj fiksis la statuton kaj elektis la membraron de la centra komitato de la svisa Vp.-asocio *Volapükaklub jveizik* (germane: *Schweizerischer Volapük-Verein*). Ĝia unua prezidanto fariĝis *Jakob Walser* (1843-1932), kiu estis asistata de G. Schmid kiel vicprezidanto kaj redaktoro, Gottlieb Wirth (St. Gallen) kiel sekretario, Emil Sonderegger (Herisau), estro de la ekzamenoj, kaj Anton Waltisbühl (Bremgarten/AG), kasisto. Ĉiuj lokaj Vp.-klubo (17 en 1888) kaj individuoj estis alvokitaj membriĝi en la nova organizo. La solvon de la demando, ĉu ĝi aliĝu al la monda Vp.-unuiĝo, oni ankoraŭ prokrastis per la klarigo, ke oni preferas atendi ĝis kiam la svisa asocio estos pli solida. La membrolistoj, same la organizaj statutoj, estis publikigitaj en la revuo *Volapükaflen jveizik*, germanlingve en n-ro 6/1888, en Vp. en la sekva eldono.



Jakob Walser

Posta evoluo: Vp. volis esti utila lingvo en komerco kaj trafiko, eksporto kaj importo kaj precipe ankaŭ en scienco kaj turismo. Tial la klopodoj de la vp.-istoj disvastigi sian lingvon en komercistaj kaj turismaj medioj estis rimarkeblaj. *Volapükaflen jveizik* ofte raportis pri komercistaj aferoj kaj ankaŭ financis sian aperadon dank' al diversaj anoncoj komercaj kaj firmaaj. La oficiala turisma oficejo en Zürich evidente uzis la novan mondlingvon ankaŭ por siaj informiloj. Schleyer, malsaniĝinta en septembro 1888, veturis al la kuracbanejo Baden/AG, kie pentekoste li akceptis la zurikajn vp.-istojn. Kvankam iuj gazetoj jam opiniis lin forpasinta, la nelacigebla grandmajstro resaniĝis kaj celkonscie daŭrigis sian laboron. Lia fiero pri la evidentaj progresoj de sia verko estis grandega. Liaj lingvo kaj movado penetris pli kaj pli ankaŭ en landojn ekster Eŭropo kaj trovis la agnoskon ne nur de la gazetaro, sed ĝuis la fidon ankaŭ de respektataj kleruloj kiel la lingvisto Max Müller (1823-1900), kaj la geografo Alfred Kirchhoff (1838-1907). Malgraŭ ĉiuj entuziasmaj klopodoj, optimismaj esperoj kaj pozitivaj konstatoj, la prospero de la Vp.-movado ne daŭris tre longe. Ĝia kulmino estis atingita ĉirkaŭ la jaroj 1888/89. La ŝvelanta konflikto inter Schleyer kaj Auguste Kerckhoffs, la estro de la Vp.-Akademio, pro lingvistikaj kaj movadopolitikaj motivoj, akriĝis la ĝeneralan krizon, malharmoniigis la samideanojn kaj rapidigis la neeviteblan disfalon de la movado. La problemoj de la disvastigo de la lingvo kaj la necerteco pri la irenda vojo konfuzis la adept-

tojn en la tuta mondo kaj paralizis la tutan agadon. Unuj subtenis la inventinton de la lingvo, kiu konsideris sian aferon sankta; aliaj preferis apogi la opinion de la eminenta pariza lingvoprofesoro, kiu argumentis el la vidpunkto de racia sciencisto. Nature oni ja ĝenerale aprobis la principajn ideojn kaj konkretajn farojn de Schleyer en si mem, sed ofte ankaŭ dubis pri la konkreta efektivigo de lia planlingvo. Tiu dubo manifestiĝis en la konstato, ke Vp. estas malfacila lingvo: oni lernas ĝin „kun eksterordinara perdo je tempo kaj forto“, lamentis *Volapükaflen jveizik*, n-ro 2/1888. Pli kaj pli ofte aŭdiĝis la postulo, ke oni devus revizii la malfacilegan gramatikon, kaj eĉ riproĉoj al Schleyer, ke li mensogis koncerne la staton de sia lingvo, ne mankis. Krome oni komencis malŝati la tro krudan, maldemokratitan konduton de Schleyer. Diversaj kampanjoj kontraŭ Vp. do estis antaŭviditaj kaj akompanis la reformdiskutojn, kiuj finfine damaĝis la aferon de Vp. Schleyer mem ignoris ĉian kritikon kontraŭ sia lingvo kaj pli kaj pli rigidiĝis en sia pozicio. Li tute ne digestis la molan puĉon dum la pariza Vp.-kongreso en 1889, kie oni deklaris la Akademion direktatan de Kerckhoffs plej supera Vp.-instanco, decidpova pri ĉiuj lingvaj kaj organizaj demandoj. La definitiva rompo de Schleyer kun ties iama kunbatalanto Kerckhoffs iĝis do neevitebla. Ĝi esence kontribuis al kompleta seniluziigo de la streĉita samideanaro, kiu devis kompreni, ke kun Vp. oni troviĝas sur erara vojo. La sekvoj estis katastrofaj: la nombro de vp.-istoj, kiuj laŭdire iam atingis centmilojn aŭ eĉ milionojn, kaj de la vp.-societoj kaj -periodaĵoj, abrupte malkreskegis (ciferojn vd. ĉe Johann Schmidt). Ankaŭ la svisa Vp.-movado ne restis indulgita de tiu tertrema kaj agonia evoluo. *Volapükaflen jveizik* aperis en 1889 nur duonamplekse (4 paĝoj anstataŭ 8 kiel en 1888). Adresaroj kun novaj membroj ne plu estis troveblaj en ĝi, raportoj pri la kluba vivo ekmanis, la propagando silentiĝis. Anstataŭe la redaktoro senfine diboĉadis pri tiklaj gramatikaĵoj kaj aperigis la tradukon de kiĉa rakonto pri montaraj travivaĵoj de Adolf Keel. La revuo ŝanĝis dufoje la presiston kaj fine de la jaro eĉ ĉesis aperi. Ankaŭ ĝia sekvanto *Jveizapot* (en Eo: Svisa Poŝto), lanĉita en 1890, ne povis bremsi la movadan falon.

Ĝia redaktoro Walser, la kapitano de la dro-ninta ŝipo, elĉerpis siajn fortojn en la kunlaboro eble kun la plej lasta aktiva svisa Vp.-ekipo de la unua generacio: Konrad kaj Anna Meisterhans (Solothurn), August Ritter (poŝtisto en Zürich), H. Stadelmann (instruisto en Stäfa), Schwarz (distrikta advokato en Zürich), C. Rietmann (prezidanto de la Vp.-klubo en St. Gallen), J.A. Locher (instruisto en Gossau), F. Brönnimann (urba geometro en Bern), J.J. Schefer (komercisto en Herisau) kaj Robert Thomann (Zürich). Thomann transiris al Eo, fine al Ido, kiel ankaŭ Schneeberger kaj Waltisbühl. Plej verŝajne *Jveizapot* malaperis jam en 1891, ĉar ĝiaj eldonoj ekde tiu tempo mankas. La likvido de la germana Vp.-Reichsverband en 1890/91, kiu havis nur du- ĝis trijaran ekzistadon, esence influis la evoluon de la movado ankaŭ en aliaj landoj. En Svislando funkciis tiam nur kvar societoj: en St. Gallen, Fribourg, Solothurn kaj Speicher/AR. Sed iom post iom ankaŭ ili ĉesis ekzisti. En 1900 nombriĝis ankoraŭ 27 kluboj tutmonde, el kiuj du en Svislando: en Basel kaj St. Maurice/VS. En 1905 la zurika Vp.-klubo restis la sola ekzistanta. La centra svisa Vp.-organizo mem estis refondita en 1899 en Basel sub la nomo *Länafed jveizänik* (en Eo: Landa Federacio Svisa) kaj daŭrigis sian aktivecon ĝis ĉ. 1901/02. Post la jarcento-ŝanĝo la Vp.-spektaklo do grandparte finiĝis. La cetera historio de Vp. estas rapide resumita: Kerckhoffs, retiriĝinte en 1891 de la akademia laboro, pereis en trajna akcidento en aŭgusto 1903 dum sia feriado en Därligen/BE apud Interlaken (Svislando). La loka ĵurnalo *Oberländisches Volksblatt* (11.08.1903) raportis: „Därligen: Pasintan dimanĉon, vespere je la 7a kaj duono, la 68-jara profesoro Auguste Kerckhoffs el Parizo, restanta de la 24a de julio kiel kurac-gasto en la pensiono du Lac, estis morte surveturita de trajno. La akcidento volis saluti en la stacidomo konatojn el la alvenanta trajno, kiam la morto lin kaptis. La tre kripligita kadavro estis transportita al la kadavrejo de Interlaken, de kie hodiaŭ oni transportos ĝin al Parizo.“ Ekzakte cent jarojn poste, la gazetaro de Berna Oberlando aperigis artikolon kun omaĝo al la akcidentinta Vp.-gravulo.

La posteulo de Kerckhoffs ĉe la akademia pinto, la ruso V.K. Rozenberger, inventis la planlingvon *Idiom Neutral* kiel malsukcesintan reformprovon por savi la aferon de la neŭtrala universala lingvo. Estante naturalisma projekto, ĝi havis nenion komunan kun la originalo de Schleyer. En 1909 la Schleyera monda organo *Volapükabled* ĉesis aperi. La sudbadena pastro mem forpasis en 1912, senluziigita pri la „mava, hontinda homaro“, kiu „por sportaj stultaĵoj disponas milionojn, sed por mia paca verko eĉ ne milono“ (Schleyer). La unua mondmilito grandparte detruis la restantaj rilatojn inter la dise loĝantaj vp.-istoj.

Post la unua mondmilito: La postmilita provo restarigi la movadon helpe de la restantaj vp.-istoj de Germanio, Aŭstrio kaj Svislando montriĝis ege malfacila, eĉ vana. Oni ja sukcesis varbi novajn interesitojn, sed multaj hezitis aliĝi al iuj organizaj strukturoj, eĉ preferis publike ne mencii sian nomon. La ĉefa revigliganto de la intermilita Vp.-movado, la nederlandano *Arie de Jong* (1865-1957), publikigis en 1931 gramatikon de la reformita Vp. Liaj du fervoraj svisaj adeptoj nomiĝis → *Jakob Sprenger* (1872-1951) kaj → *Walter/Gautier Henri (Slaheddine) Schuetz* (1906-1995), kies detalaj biografioj kun fotoj estas prezentitaj ĉi-sekve. (Schneeberger kaj Waltisbühl → Ido en Svislando).

→ Antologio

Walter / Gautier Henri (Slaheddine) SCHUETZ


1906-1995



Sub la influo de pia protestanta edukado (lia origine katolika patro konvertiĝis al la protestantismo) kaj post la baza lernejo kaj la progimnazio en Berno, S. elektis vivovoĵon religian, kiu fariĝis simila al odiseo, kun la celo trovi la monoteisman, sed samtempe universalan religion. La vizitado de la sinagogo, la legado de vojaĝraportoj kaj la studado de la korano kondukis lin al la fascino pri la juda kaj arab-islamaj kulturoj. En la 1920aj jaroj S. forlasis Svislandon por sperti la vivadon en Nordafriko. Dum la politike malstabila tempo en Tunizio 1931-59 li vivis en adventista seminario en Collonges-sous-Salève (Francio) apud Ĝenevo kaj instruadis la germanan lingvon en privata duagrada lernejo. Parte li pasigis sian tempon en Diemtigen/Horboden en Berna Oberlando (kie li publikigis siajn aŭtobiografiojn *Unter Halbmond*, *Kreuz und Davidstern* 1939, *Rückkehr zum Judentum*, 1939, kaj *Israels Katholizismus*, 1940). Kiel bernano S. okupiĝis pri la skribmaniero de la alemana (berna) dialekto, krome li studis la ĉinan, korean kaj vjetnaman lingvojn, redaktis *Etudes Confucéennes* (1950-62) kaj fondis la sintezan institucion *Synagogosquégglise* kun la celo harmoniigi la konfesojn judan, islaman kaj kristanan. Nomante sin privata teologo, S. vaste korespondadis, i.a. kun tuaregoj, samarianoj en Palestino kaj kun mandeaj pastroj en Irako, sed ankaŭ kun la israela verkisto Ŝalom Ben-Chorin (1913-99). En 1960 S. reveturis al Tunizo kaj en 1965 translokiĝis al la katolika insulo Malto, akompanata de sia patrino

Louise (+1977), kie en 1976 li oficiale aliĝis al la tria ordeno de Francisko de Asizo (TOF). Specifaĵo ĉe S. estis, kies origina baptonomo estis Walter, ke li, depende de la loĝloko kaj de sia kultura identiĝo, portis diversajn pseŭdo- aŭ honor-nomojn: Elieser, Braitou Ben-Noah, Halef Omar, Salah Eddin Kemal, Slah(eddine), Zoloach Aldin, Der Luisensohn, Henri de la Madonne, Henri de Joseph, il-Malti, Onkelos, Orham Chaldon, Cao-Thiên-Tiên ktp.

Dank' al la elstaraj arablingvaj konoj de S. povis esti ellaboritaj kaj eldonitaj en la eldonejo Langenscheidt la Polyglott-lingvo-vidiloj pri la tuniz-araba (Köln 1965) kaj la malta lingvoj (Köln 1967, 2a eld. 1971). En 1982/83 S. translokiĝis al Egiptio, kie komence li vivis en la katolika monaĥejo Mokattam en Kairo, poste en maljunulejo de El-Maadi, kie li mortis.



Volapük-diplomo de Schuetz

En la periodo de Arie de Jong (1865-1957) de la 1930aj jaroj S. fervore okupiĝis pri Vp., tradukante suraĵojn al Vp., korespondante kun vp.-istoj en diversaj landoj, krom kun de Jong mem ankaŭ kun la germana vp.-isto Johann Schmidt (1895-1977) kaj kun la leningrada (inter-)lingvisto Nikolaj Juŝmanov (en Vp. kaj en la jud-araba lingvo). Krome S. rilatis kun la svisa vp.-isto → Jakob Sprenger. La Vp.-konoj de S. atingis tiom altan gradon, ke en 1935 la tiama ĉifalo, profesoro Albert Sleumer (1876-1964) en Bad Godesberg (Germanio), honorigis lin per la Vp.-diplomo (tidan volapŭka, bildon vd. supre). Johann

Schmidt, la verkinto de Vp.-lernolibro por germanoj (1933), laŭdis S. kiel „nelacigeblan batalanton“ de Vp.; kaj la sovetiano Ernest Drezen (1892-1937) substrekiis en sia *Historio de la mondlingvo* (1931) la signifon de tiu „tunisa [tiel!] arabo loĝanta en Horboden (Svisio)“, nomata Salah Eddine Kemal, evidente ne konsciante, pri kiu persono vere temas. Krom Vp. S. posedis ankaŭ konojn de Eo, sen esti ĝia adepto, kaj li evidente ne tre ŝatis, kiam lia juna korespondanto Andy Künzli, kiu vizitis S. en Malto en 1982, lernis Eon kaj dediĉis sian tempon al la Eo-agado.

Jakob SPRENGER

1872-1951



Kiel filo de simplaj kaj katolike piaj gepatroj, S. havis vivon malfacilan kaj plenan je aventuroj. Post la baza lernejo en Speicher/AR en 1877 li eniris la gimnazion en Einsiedeln/SZ kaj en 1888 vizitis la gimnazion kaj la universitaton en Fribourg. Laŭ la deziro de la loka paroĥestro S. devintus studi teologion. Sed baldaŭ li konstatis, ke tiu studodirekto ne taŭgas por li, kaj do li preferis studojn pri historio kaj literaturo por fariĝi gimnazia fakinstruisto. Monaj malfaciloj forpelis lin de la studoj, kaj la financa ruiniĝo de la patro devigis lin serĉi pagatan laboron. Sekve li laboris jen kiel librotenisto, jen kiel helpanto de iu svisa inĝeniero, kiu konstruis fervojan linion en Etiopio. En 1907 S. fariĝis sendependa broda fabrikestro, eĉ kun propra kaj dume sukcesa firmao. Sed la unua mondmilito fiaskigis la entreprenon. Forpuŝita de la industria vivo, S. ekokupiĝis pri sociaj kaj ekonomiaj demandoj kaj komencis (sub la

pseŭdonomo Theseus) akre kritikadi la interezan politikon de la bankoj. En 1915 S. fondis kun kelkaj amikoj la *Internacian Libेरigan Ligon* (germane: *Internationaler Befreiungsbund*, en Vp.: *Leli-vükamafed bevü-netik*), kies sekretario li mem fariĝis. La organizo sekvis la principojn de la kristana etiko, celis efektiviĝi la liberekonomian doktrinon de Silvio Gesell (1862-1930), eldonante proprajn skribaĵojn (ekz. *Der Weg zum Ziel. Einführende Schrift in die natürliche Wirtschaftsordnung: Freigeld, Absolute Währung, Freiland*, Speicher 1921, ktp.). Vp. estis aplikata kiel internacia laborlingvo de la organizo. Lia peto oficialigi la unuiĝon en Lihtenŝtejno (1930/31) estis rifuzita de la lokaj instancoj. Lige kun sia propagando por tiu afero S. administris la gazeton *Liechtensteinische Freiwirtschaftliche Zeitung*, verkadis ekonomisciencajn literaturaĵojn kaj varbis por la internacia liberekonomia movado. Ŝajnas, ke en 1938 S. planis peti aŭdiencon ĉe Adolf Hitler por konvinki lin pri sia politika programo baziĝanta sur amo kaj justeco. Kun Vp. S. konatiĝis hazarde kaj amuze en 1884 pere de artikolo aŭ anonco pri Vp., kiu estis presita en gazetpeco envolvanta fromaĝon. Ĉar la loka pastro trudis al la junulo lerni la latinan lingvon, S. povis pluokupiĝi pri Vp. nur en 1890 kiel studento en Fribourg; sed ankaŭ ĉi tie lia hobio estis daŭre ĝenata de la severa lerneja regularo. En 1891, la jaro de lia diplomiĝo kiel Vp.-instruisto, S. ekinstruis tiun lingvon en Speicher kaj Fribourg, kie li fondis klubojn (tial li ricevis la oficialajn Vp.-titolojn de ĉefinstruisto, klubprezidanto kaj profesoro). Gajninte la personan fidon de J.M. Schleyer, S. vizitadis lin en la domo de la familio Billinger en Konstanco (Germanio), kie troviĝis la centra oficejo de la Vp.-movado. Dum la intermilita periodo S. translokiĝis de Speicher al Wienacht/AR (1924) por daŭrigi sian laboron por la ŝlejera verko. En 1927 S. transprenis de la familio Billinger la bibliotekan postlasaĵon de Schleyer, sed neniam pagis la interkonsentitan prezon [post la morto de S., lia filino, Ria Berger, vendis la tuton al (la murdita ekonomista funkciulo) Hanns Martin Schleyer (1915-1977) – ĉi tiu estis la filo de nevo de J.M. Schleyer].

Sekve S. subtenis la lingvo-reformojn de Arie de Jong. La 16an de aŭgusto 1948, S., loĝanta en Gams/SG, mem fariĝis, laŭ la iama deziro de Schleyer, lia oficiala posteulo (4a 'cifal'). Kiam la internacia Vp.-centro migris al Nederlando, S. eldonis diverslingvajn lerniletojn verkitajn pri kaj en Vp. fare de la nederlanda vp.-isto Filippus Johann Krüger (1911-92), kiu estis la 6a Vp.-estro inter 1977 kaj 1983. Pro pli kaj pli forta malsano en junio 1950 S. fordonis ĉiujn altajn oficojn al sia posteulo, la germano Johann Schmidt (1895-1977).

Zamenhof pri Volapük kaj Schleyer

Laŭ la disponeblaj fontoj eblas konkludi, ke L.L. Zamenhof negative pritaksis la aperon de Vp., des pli ĉar li vidis en ĝi malutilan kontribuon al la solvo de la internacilingva problemo. En sia sufiĉe longa traktajo 'Esperanto kaj Vp.', aperinta en *La Esperantisto* 1989/90, L.L. Zamenhof konfirmis, ke post la publikigo de sia lingvo Eo, li ricevis negativajn reagojn de vp.-istoj („multaj vp.-istoj, kiuj nun fariĝis varmegaj amikoj de la lingvo Eo, konfesis al mi, ke eĉ havante mian libron, ili longan tempon ne volis ĝin eĉ legi, estante konvinkitaj, ke ĉia nova sistemo estas absolute malutila!“). Plej ŝokis lin la riproĉo de iuj vp.-istoj, ke Zamenhof kvazaŭ konstruis Eon sur la bazo de la sukcesoj de Vp. Por rifuzi tiun absurdan argumenton Zamenhof menciis, ke lia laboro por la internacia lingvo komenciĝis eĉ antaŭ Vp. („kiam mia laboro jam estis finita, pasis kelkaj jaroj, ĝis mi ricevis la eblon eldoni mian verkon“). Kiam Zamenhof eksciis pri la lingvo Vp., li fakte seniluziĝis pri ĝi („mi baldaŭ vidis, ke ekster la nomo kaj ekster laŭdaj reklamoj ĝi nenion en si enhavas“) kaj daŭrigis sian propran projekton. Zamenhof eĉ publike konfesis, ke „por la sankta unuanimeco, mi kun granda plezuro forĵetus mian laboron kaj aliĝus al Vp., se mi povus kredi, ke Vp., en ĝia nuna formo aŭ en formo plibonigita, havas eĉ la plej malgrandan eblon atingi la celon.“ Poste sekvas lia substancia kritiko de Vp.: „Ĝi estas arta kaj arbitre elpensita lingvo, kiun neniu

en la mondo komprenas kaj per kiu vi kun neni povas komunikiĝi. Ĝi estas nomita lingvo tutmonda nur pro tio, ke se la tuta mondo ĝin ellernus, tiam ĉiuj ĝin komprenos! Nenian alian econ tutmondan tiu ĉi lingvo havas, kaj sinjoro Schleyer eĉ ne trovis necesse peni doni al sia lingvo iajn ecojn, per kiuj ĝi povus faciligi la komunikiĝojn internaciajn!“ La tutan propagandon kaj personan kulton ĉirkaŭ Schleyer Zamenhof trovis ridinda kaj li estis konvinkita, ke tian lingvon kiel Vp. la mondo ne akceptos. Do li opiniis, ke inventi Vp.-on ne necesis, kaj al la vp.-istoj li riproĉis naivan blindecon. Lia polemiko kontraŭ la manko de tutmondeco de Vp. eĉ alprenis ĉarme ironian tonon: „Kiam mi vidis, ke de tiu tutmondeco tute ne ekzistas eĉ la plej malgranda signo kaj la tuta tutmondeco konsistas nur en la nomo, kaj ke oni povas la unuan trovitan ŝtonon nomi butero kaj proponi al la homoj ŝmiri ĝin sur pano, - mi estis tiel frapita, ke se la ideo de lingvo tutmonda ne estus por mi tiel kara, mi estus preta en la unua minuto fariĝi vp.-isto!“ Por ne provoki ĉe la vp.-istoj la kulpigon pro polemiko, envio aŭ malamo kontraŭ ilia lingvo, Zamenhof analizis en sia artikolo „ĉiujn bonajn ecojn de Vp., malgraŭ ke ili, kiel mi jam diris, danke la mankon de la ĉefa eco, havas por ni nenan signifon.“ Kaj li aldonis sarkasme: „Feliĉe tiuj bonaj flankoj en Vp. estas tiel malmultaj, ke mi ne bezonas multe turmenti per ili la leganton.“ Do evidente Zamenhof estis tre ĉagrenita pro la lanĉado de Vp. En la analizo de la ŝajne bonaj flankoj de Vp. montriĝis, ke ankaŭ tiuj flankoj estas finfine malbonaj (sonoj, elparolebleco, natureco, facileco, mallongeco ktp.). Pri la rezulto de la propra analizo Zamenhof devis esti mem embarasita kaj petis pardonon kaj komprenon pro la vidpunktoj esprimitaj en la artikolo: „Sinjoro Schleyer pardonu al mi, se mi detruis lian ĉefan aŭreolon, se mi faris nulon el tio, kion liaj amikoj nomas lia plej ĉefa merito. Mi faris tion ĉi ne, ĉar mi envidus liajn laŭrojn aŭ volus malgrandigi lian indon; kontraŭe, mi alte estimas s-ron Schleyer kaj donas plenan konfesion al liaj grandegaj laboroj kaj al lia nobla deziro alporti utilon al la homo. (...). Sed mi ne povas vidi meriton tie, ke absolute nenia ekzistas.“ Do ĉi tiu artikolo estas impresa dokumento

pri la sentoj, kiujn la kreinto de Eo devis havi kaj digesti, kiam li prikomentis la honorindan, sed strangan projekton de Schleyer.

Zamenhof estis konvinkita, ke Vp. malfaciligis la situacion de la neŭtrala universala lingvo. En *Germana E-isto*, 2/1905, li notis: „Vp.‘, diras multaj, ‘ebenigis la vojon por novaj sistemoj kaj faciligis al li la batalon!’ Sed vi vidas, sinjoroj, ke ĝi estas tute ne tiel: Vp. ne faciligis, sed forte, forte malfaciligis tiun ĉi batalon.“ Kaj li logike konkludis, ke ĉar Vp. jam rikoltis malamikojn ankaŭ Eo kaj aliaj planlingvaj projektoj trovas malamikojn, ridon kaj mokon. La cirkonstancojn, kiuj ekzistis kiam Eo estis prezentita, Zamenhof konsideris malfavoraj („Eldonistoj neniel volis preni sur sin la eldonadon de mia verko: ‘jam ekzistas ja Vp.’, oni diris al mi ĉie“).

En sia kongresa parolado en Boulogne-sur-mer en 1905 Zamenhof menciis kelkajn meritoplenajn pionirojn de Eo, kiuj faris esencan kontribuon al la disvastigo de la planlingva ideo kaj de Eo. Krom la germanoj Leopold Einstein kaj Wilhelm Heinrich Trompeter kaj la polo Jozefo Waśniewski li menciis ankaŭ Johann Martin Schleyer, la aŭtoron de Vp. Ilin ĉiujn li honorigis per la titolo „batalantoj de nia afero“. Zamenhof diris: „Mi sentas la devon diri ĉi tie kelkajn vortojn pri unu homo, kiu havas tre grandajn meritojn en nia afero kaj al kiu bedaŭrinde la e-istoj ofte rilatas maljuste nur tial, ĉar li, multe farinte por la ideo de lingvo internacia ĝenerale, ne apartenas tamen al la amikoj de tiu speciala lingva formo, por kiu ni batalas. (...) La lingva formo, por kiu laboris tiu respektata maljunulo, montriĝis ne praktika; la vojo kiun li elektis, montriĝis ne bona, kaj la afero, por kiu li batalis, baldaŭ falis, kaj per sia falo ĝi alportis grandan malutilon al nia ideo entute kaj precipe al tiu speciala formo de la ideo, por kiu ni batalas. Sed ni devas esti justaj, ni devas taksii ĉiun homon ne laŭ lia venko aŭ malvenko, sed laŭ liaj laboroj. Kaj la laboroj kaj meritoj de sinjoro Schleyer estis tre grandaj. Kun granda fervoro li laboris por la ideo de lingvo internacia en la daŭro de multaj jaroj; dum multaj personoj donadis nur nudajn projektojn, li estis la unua, kiu havis sufiĉe da pacienco, por ellabori plenan lingvon de la komenco ĝis la fino

(kvankam Eo tiam estis jam preta, ĝi ne estis ankoraŭ publikigita), kaj ĝi ne estas lia kulpo, se la lingvo montriĝis ne praktika. Li estis la unua, kiu per senlaca laborado vekis la intereson de la mondo por la ideo de lingvo neŭtrala, kaj ĝi ne estas lia kulpo, se lia falinta afero por longa tempo malvarmigis la mondon por ĉia arta lingvo. Li volis fari grandan bonon, kaj por la atingo de tiu bono li laboris tre multe kaj fervore, kaj ni devas lin taksu ne laŭ lia sukceso, sed laŭ lia volo kaj laboro. Se la ideo de lingvo internacia iam venkos la mondon – tute egale, ĉu ĝi estos sub la formo de Eo aŭ de alia lingvo – la nomo de Schleyer okupos ĉiam la plej honoran lokon en la historio de nia ideo, kaj tiun ĉi nomon la mondo neniam forgesos. Mi esperas, ke mi esprimos la opinion de ĉiuj partoprenantoj en nia kongreso, se mi diros: ‘ni esprimas nian koran dankon al sinjoro Schleyer, la unua kaj plej energia pioniro de la ideo de neŭtrala lingvo internacia’“.

Schleyer denove estis memorata de Zamenhof en ties kongresaj festparoladoj en Dresdeno en 1908 kaj en Antverpeno en 1911. En Germanio, „lando de la filozofoj kaj poetoj, kiu estis iam la centro de la humanistoj“, Zamenhof emfazis denove la grandan meriton de la pastro Johann Martin Schleyer, dank’ al kiu „nia ideo ricevis sian unuan disvolviĝon kaj la unuan potencan puŝon antaŭen.“ En Antverpeno, gratulante al la okdekjara Schleyer, li nomis la aŭtoron de Vp. „la vera patro de la tuta internacilingva movado“, kaj diris unu fojon pli: „Li estis la unua, kiu diris al si: por lingvo internacia mi volas ne revii, sed labori; dum ĉio ĉirkaŭe dormis, li estis la unua, kiu praktike kreis la internacilingvan movadon.“ Pri la kialoj de la fiasko de Vp. Zamenhof klarigis: „Vp. ne estis venkita de Eo, kiel multaj personoj pensas tute erare; ĝi pereis per si mem en tiu tempo, kiam la trankvile kaj senartifike laboranta Eo estis ankoraŭ tro malforta por iun venki; ĝi pereis ne pro sia stranga sonado aŭ pro aliaj similaj kaŭzoj, ĉar al ĉio oni povas alkitimiĝi, kaj kio hieraŭ ŝajnis sovaĝa, tio morgaŭ aperas kiel io tute natura kaj bela; per longa kaj multespeca uzado eĉ la plej sovaĝa idiomato de la plej barbara gento iom post iom fariĝas riĉa, eleganta kaj oportuna lingvo. Vp. pereis ĉefe pro unu grava eraro, kiun ĝi

bedaŭrinde enhavis: absoluta manko de natura evoluipovo; kun ĉiu nova vorto aŭ formo la lingvo devis konstante dependi de la decidoj de unu persono aŭ de facile inter si malpaconta personaro. Kiel sur bastono plantita en teron, novaj branĉoj kaj folioj ne povis nature kreski sur ĝi, sed devis esti konstante skulptataj kaj algluataj. Se ne ekzistus tiu eraro, kiun korekti oni bedaŭrinde ne povis, Vp. neniam pereus kaj ni ĉiuj nun verŝajne parolus volapŭke. Sed tiu bedaŭrinda eraro, kiun kaŭzis ne manko de talento kaj de laboremece, sed nur tro rapida publikigo de la lingvo, sen sufiĉe matura elprovado, - tiu eraro, kiu pereigis Vp.-on, neniel malgrandigas la meritojn de ĝia aŭtoro, kiu la unua potenco skuis la mondon por nia ideo; la grandaj meritoj de Schleyer en la internacilingva historio neniam malaperos.“ Kaj Zamenhof proponis, ke „okaze de la festo de Schleyer ni telegrafe sendu al li en la nomo de la tuta e-istaro nian koran gratulon, nian dankon por lia granda laboro kaj nian deziron, ke li vivu ankoraŭ longe kaj havu la konscion, ke la fruktoj de lia laboro neniam pereos.

Do el tiuj citaĵoj elvideblas, ke Zamenhof en sia omaĝo kaj kritiko faris klaran diferencon inter la grandaj personaj meritoj de Schleyer kaj la malsukceso de lia projekto Vp.



Rund um die Welt – Zeitschrift für Volapükisten (1888-1992)